Ordo de Diservo

MATENPREGO

—x—

Tradukis kaj Kompilis
REV. JAMES L. SMILEY
Annapolis, Maryland
Usono

—x—

Por uzo en la Preĝejo de Sankta Anno,
Annapolis, La 30an de Julio, 1916

Laŭ la permeso de la Episkopo de
Marilando, kaj la Parohestro

Ce la Naŭa Ciujara Kongreso de la
ESPERANTISTA ASOCIO
de
NORDA AMERIKO
Julio 27-30, 1916

—x—

Car, kiel ajn multaj estas la promesoj de Dio,
en Jesuo estas la Jes. II Kor. 1:20

ORDO DE MATENPREĜO

Ĉiuj staras kaj kantas

HIMNON

"Sur Kristo Sin Apogas"

Sur Kristo sin apogas
La sankta eklezi';
Per akvo kaj la Vorto
Kreita estas ŝi.
Por sia sanktedzino
Li venis el ĉiel',
Per sango ŝin aĉetis,
Kaj sia mortsigel'.

Sin el nacio ĉiu
De l' mond' elektis li,
Nur unu kredon,—bapton,—
Sinjoron,—konas ŝi.
Ŝi unu nomon benas;
Kaj pano el ĉiel'
Sin nutras, dum espero
Sin gvidas al la cel'.

De l' mondo nun mokata
Si vivas en sufer';
Per skismoj disigata,
Herezoj kaj malver';
Sanktuloj tamen pregas
Ke, per la Dia ben',
La nokta ploro ĉesu,
Kaj venu ĝoj-maten'. Amen.

Daŭru starante

La Pastro legas la jenajn sentencojn de la Sankta Skribo:

La Sinjoro estas en sia sankta templo: silentu la tuta tero.

Mi ekĝojis, kiam oni diris al mi, Ni iru en la domon de Dio.

Mi leviĝos kaj iros al mia patro, kaj diros al li, Patro, mi pekis kontraŭ la ĉielo kaj antaŭ vi, kaj mi jam ne indas esti nomata via filo.

Tiam diras la Pastro:

Karege amataj gefratoj, la Sankta Skribo devigas nin, multafoje, por konfesi niajn diversajn kaj multenombrajn pekojn kaj malvirtojn; kaj ke ni devas ne kaŝi ne kovri ilin antaŭ la vizaĝo de Ĉiopova Dio nia Ĉiela Patro; sed konfesi ilin kun humila, penta kaj obeema koro tiucele ke ni ricevu pardonon je la samaj, per lia infinita boneco kaj kompateco. Kai kvankam ni devas ĉiam humile konfesi

niajn pekojn antaŭ Dio, tamen devas ni precipe tion fari, kiam ni kunvenas kaj ĉeestas por redoni dankojn pro la grandaj bonfaroj, kiujn ni estas ricevintaj de liaj manoj, por elmontri lian plej meritan laŭdon, por aŭdi lian plej sanktan Vorton, kaj por peti tiajn aferojn kiaj estas bezonaj kaj necesaj, kiel por la korpo tiel ankaŭ por la animo. Tial mi petas kaj petegas vin, ĉiujn ĉeestantojn, por akompani min kun pura koro kaj humila voĉo, al la trono de la ĉiela graco, dirante—

(Ĉiuj kune diras, genufleksante)

Ciopova kaj plej kompatema Patro;
Ni estas erarintaj kaj vagintaj for de viaj vojoj kiel perditaj ŝafoj,
Ni estas sekvintaj tro multe la devizojn kaj dezirojn de niaj propraj koroj.
Ni estas ofendintaj kontraŭ viaj sanktaj leĝoj.
Ni estas mankintaj fari tiajn aferojn kiajn ni devas esti farintaj;
Kaj ni estas farintaj tiajn aferojn kiajn ni devas ne esti farintaj;
Kaj estas neniu sano en ni.
Sed vi, ho Sinjoro, kompatu nin, mizerajn ofendintojn.
Ŝparu tiujn, ho Dio, kiuj konfesas siajn kulpojn.
Restarigu tiujn kiuj estas pentaj;

Laŭ viaj promesoj klarigitaj al homaro
en Kristo Jesuo nia Sinjoro.
Kaj plenumu peton, plej kompatema Pa-
tro, pro li,
Ke ni de nun vivu dian, justan kaj so-
breman vivon,
Al la gloro de via sankta Nomo. Amen.

La Pastro stariĝas, kaj diras al la genuflekskanta Popolo:—

Ciopova Dio, nia ĉiela Patro, kiu pro sia granda kompato promesis pardoni la pekojn de ĉiuj sin alturnantaj al li kun kora pento kaj vera fido; Li kompatu al vi; vin pardonu kaj absolvu de ĉiuj viaj pekoj; vin firmigu kaj fortigu por ĉia boneco; kaj konduku vin al vivo eterna; per Jesuo Kristo nia Sinjoro. **Amen.**

Ĉiuj kune diras:

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, Sanktiĝu via Nomo. Alvenu via regno. Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ. Kaj formetu al ni ŝuldojn niajn, kiel ankaŭ ni formetas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Car via estas la regno, la povo kaj la gloro eterne. Amen.

Pastro: Ho Sinjoro, malfermu vi niajn lipojn.

Popolo: Kaj nia buŝo elmontros vian laŭdon.

(Ĉiuj starante)

Pastro: Gloro al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta;

Popolo: Kiel estis en la komenco, tiel nun estas, kaj ĉiam estos, eterne. Amen.

Pastro: Laŭdu vi la Sinjoron.

Popolo: La Nomo de la Sinjoro estu laŭdata.

La "Venite" (Legu responde)

Venu, ni kantos al Dio: ni ĝoje krios al la rifuĝejo de nia helpo.

Ni venu antaŭ lian vizaĝon kun glorado: per psalmoj ni ĝoje krios al li.

Car granda Dio estas la Eternulo: kaj granda reĝo super ĉiuj dioj.

Kiu havas en sia mano la profundajojn de la tero: kaj al kiu apartenas la altajoj de la montoj.

Al kiu apartenas la maro, kaj li ĝin faris; kaj la sekteron liaj manoj kreis.

Venu, ni kliniĝos, ni jetos nin teren: ni genuos antaŭ Dio, nia Kreinto.

Car li estas nia Dio: kaj ni estas la popolo de lia paŝtejo kaj la ŝafoj de lia mano.

Kliniĝu al Dio en sankta respekto: tremu antaŭ li la tuta tero.

Car li venas, ĉar li venas, por juĝi la teron: li juĝos la mondon kun justeco kaj la popolojn kun sia fideleco.

Gloro al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta;
Kiel estis en la komenco, tiel nun estas, kaj ĉiam estos, eterne. **Amen.**

Oni sidiĝas. La Pastro legas la unuan lecionon: Eliro III.

Tiam Ĉiuj stariĝas kaj legas responde: La "Benedicite"

Ho ĉiaj farajoj de la Sinjoro, gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.
Ho Anĝeloj de la Sinjoro, gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.
Ho Cieloj,
Ho Akvoj super la firmamento,
Ho ĉiaj Potencoj da la Sinjoro,
gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.
Ho Suno kaj Luno,
Ho Steloj de ĉielo,
Ho Pluvoj kaj Roso,
gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.
Ho Ventoj de Dio,
Ho Fajro kaj Varmeco,
Ho Vintro kaj Somero,
gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Rosoj kaj Frostoj,
Ho Frosto kaj Malvarmeco,
Ho Glacio kaj Neĝo,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Noktoj kaj Tagoj,
Ho Lumo kaj Mallumo,
Ho Fulmoj kaj Nuboj,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Tero,
Ho Montoj kaj Montetoj,
Ho ĉiaj Verdajoj sur la tero,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Putoj,
Ho Maroj kaj Alfluoj,
Ho Balenoj, kaj ĉiaj Movantoj en la akvoj,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Birdoj de la ĉielo,
Ho Bestoj kaj Brutoj,
Ho Homidoj,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Izraelo,
Ho Pastroj de la Sinjoro,

Ho Servantoj de la Sinjoro,

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Ho Spiritoj kaj Animoj de la Justuloj,
Ho Sanktuloj kaj kore Humiluloj.

gloru vi la Sinjoron: adoru lin, kaj laŭdegu lin por ĉiam.

Gloru al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta;
Kiel estis en la komenco, tiel nun estas, kaj ĉiam estos, eterne. **Amen.**

(Oni sidiĝas. La Pastro legas la duan lecionon: La Agoj XV ĝis 32.)

Tiam ĉiuj staras kaj legas responde:
La "Benedictus"

Benata estu la Sinjoro, la Dio de Izrael: ĉar li vizitis sian popolon kaj faris por ili elaĉeton;
Kaj levis kornon de savo por ni: el la domo de sia servanto David;
Kiel li parolis per la buŝo de siaj sanktaj profetoj: de la komenco de la mondo;
Savadon el niaj malamikoj; kaj el la manoj de ĉiuj malamantaj nin.
Gloru al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta;
Kiel estis en la komenco, tiel nun estas, kaj ĉiam estos, eterne. **Amen.**

Ĉiuj, starante, kune diras la Kredon:

Mi kredas en Dio la Patro Ĉiopotenca, Kreinto de ĉielo kaj tero:
Kaj en Jesuo Kristo lia unika Filo nia Sinjoro: Kiu estis naskigata de la Spirito Sankta, Naskata el la Virgulino Mario: Suferis sub Poncio Pilato, Estis krucumata, mortiĝis kaj entombiĝis: Li subiris en hadeson; La trian tagon li reviviĝis el la mortintoj: Li supreniris en ĉielon, Kaj sidas ĉe la dekstro de Dio la Patro Ĉiopova: El tie li venos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

Mi kredas en la Spirito Sankta: La Sankta Katolika Eklezio: La komunio de Sanktuloj: La pardono de pekoj: La Reviviĝo de la mortintoj: Kaj la Vivo eterna. Amen.

Pastro: La Sinjoro estu kun vi.
Popolo: Kaj kun via spirito.
Pastro: Ni preĝu.

(Ĉiuj genufleksas.)

Pastro: Ho Sinjoro, elmontru vian kompatecon por ni.
Popolo: Kaj donu al ni vian savadon.
Pastro: Ho Dio, purigu niajn korojn interne.
Popolo: Kaj ne forprenu de ni vian Sanktan Spiriton.

(Preĝetoj jenaj, dirate de la Pastro:)
Por tiu ĉi tago (la Sesa Dimanĉo Post Triunuo)

Ho Dio, kiu preparis por tiuj amantaj vin tiajn bonaĵojn kiuj superas ĉian intelekton; En niajn korojn versu tian amon al vi, ke ni, amante vin super ĉio, obtenu viajn promesojn, kiuj superas ĉion kion ni povas deziri: per Jesuo Kristo nia Sinjoro. **Amen.**

Por Paco

Ho Dio, kiu estas la kreanto de paco kaj la amanto de harmonio, en sciado de kiu restas nia eterna vivo, kies servo estas perfekta libereco; Defendu nin viajn humilajn servantojn dum ĉiaj atakoj de niaj malamikoj; por ke ni, certe konfidante al via defendo, ne timu la povon de iaj kontraŭuloj, per la potenco de Jesuo Kristo nia Sinjoro. **Amen.**

Por Graco

Ho Sinjoro, nia ĉiela Patro, Ĉiopova kaj eterna Dio, kiu estas kondukinta nin bonstate al la komenco de ĉi tiu tago; Defendu nin dum la sama per via granda potenco; kaj donu ke tiun ĉi tagon ni falu en nenian pekon, nek kuru en ian danĝeron; sed ke ĉiuj niaj faroj, ordonataj per via direkto, estu justaj antaŭ via vizaĝo; per Jesuo Kristo nia Sinjoro. **Amen.**

Por la Prezidanto de Usono kaj ĉiuj oficistoj civilaj

Ho Sinjoro, nia ĉiela Patro, Ie plej alta kaj

potenca Reganto de la universo, kiu el via trono rigardas ĉiujn loĝantojn sur la tero; Fervore ni petegas vin, per via favoro rigardi kaj beni vian servanton La Prezidanton de Usono kaj ĉiujn aliajn civilajn oficistojn; kaj tiel replenigu ilin per la graco de via Spirito Sankta, ke ili ĉiam sin inklinu al via volo, kaj iru laŭ via vojo. Dotu ilin plene je ĉielaj donacoj; okazigu ilin sane kaj prospere longatempe vivi; kaj fine, post ĉi tiu vivo, obteni eternan ĝojon kaj felicon; per Jesuo Kristo nia Sinjoro. **Amen.**

Por la Pastroj kaj la Popolo

Ciopova kaj eterna Dio, de kiu venas ĉia bona kaj perfekta donaco; Sendu desupren sur niajn Episkopojn, kaj aliajn Pastrojn, kaj sur la Kongregaciojn komisiatajn al ilia zorgo, la sanigan Spiriton de via graco; kaj, por ke ili vere plaĉu al vi, versu sur ilin la senĉesan roson de via beno. Okazigu ĉi tion, ho Sinjoro, pro la honoro de nia Advokato kaj Propetanto, Jesuo Kristo. **Amen.**

Por Ĉiaj Statoj de Homaro

Ho Dio, la Kreinto kaj Gardanto de ĉiu homaro, ni humile petegas vin pro ĉiaj homoj kaj iliaj statoj; ke plaĉu al vi sciigi viajn vojojn al ili, vian sanigecon al ĉiuj nacioj. Precipe ni pregas pro via sankta Eklezio universa; ke ĝi tiel estu gvidata kaj regata de via bona

Spirito, por ke ĉiuj kiuj konfesas kaj sin nomas Kristanoj gvidiĝu en la vojon de vero, kaj tenu la fidon en spirita unueco, en la ligilo de paco kaj en justeco de vivo. Fine, ni rekomendas al via patra boneco ĉiujn iel doloratajn aŭ mizeraj je animo, korpo aŭ havo; ke plaĉu al vi komforti kaj helpi ilin laŭ iliaj respektivaj bezonoj; donante al ili paciencon dum iliaj suferadoj, kaj feliĉan eliron for de ĉiuj iliaj doloroj. Kaj ĉi tion ni petegas pro Jesuo Kristo. **Amen.**

Komuna Dankado

Ĉiopova Dio, Patro de ĉiaj favoroj, ni viaj senindaj servantoj, donas al vi humilegajn kaj koregajn dankojn pro ĉiuj viaj boneco kaj favorkoreco al ni, kaj al ĉiuj homoj. Ni gloras vin pro nia kreo, gardo, kaj ĉiuj benadoj de ĉi tiu vivo; sed antaŭ ĉio, pro via netaksebla amo je la elaĉeto de la mondo per nia Sinjoro Jesuo Kristo; pro la iloj de graco, kaj pro la espero de gloro. Kaj ni petegas al vi, donu al ni tian devatan senton de ĉiuj viaj favoroj, por ke niaj koroj estu sincere dankemaj; kaj ke ni elmontru vian adoron, ne nur per niaj lipoj, sed per niaj vivadoj, oferante nin mem al via servo, kaj marŝante ĉeeste vi je sankteco kaj justeco ĉiujn niajn tagojn; per Jesuo Kristo nia Sinjoro, al kiu, kun vi kaj la Spirito Sankta, estu ĉia honoro kaj gloro eterne.

Amen.

Preĝo de Sankta-Orabuŝo

Ĉiopova Dio, kiu estas doninta al ni gracon nuntempe, unuanime, fari niajn komunajn preĝojn al vi; kaj promesas ke kiam du aŭ tri estas kunvenintaj en via nomo, vi plenumos iliajn petojn; Elfaru nun, ho Sinjoro, la dezirojn kaj petojn de viaj servantoj, kiel estos plej helpeme al vi; donacante al ni en ĉi tiu mondo sciadon de via vero, kaj en la mondo estonta vivon eternan. **Amen.**

II Korint. XIII-14

La graco de la Sinjoro Jesuo Kristo, kaj la amo de Dio, kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun ni ĉiuj por ĉiam. **Amen.**

Ĉiuj staras kaj kantas Himnon
"Marŝu Ĉiu Paca, Pia Militist"

Marŝu ĉiu paca,
Pia militist'
Sub standard' de l'kruco
Pro Jesuo Krist'.
Nia sankta Estro
Gvidos nin al bon'.
Al batal'—antaŭen!—
Jen, triumfa son'.
Marŝu ĉiu paca,
Pia militist'
Sub standard' de l'kruco
Pro Jesuo Krist'.

Jen triumfa signo!
Venkis Kristanar'—
Kaj Ŝatan' pereas
Kun Satananar'.
Falas fundamentaj
Muroj de l' Infer'!
Laŭdkantad' eksonu
Ĉie sur le ter'.
Marŝu ĉiu paca, k. t. p.

Vanta kaj pasema
Estas reĝa kron',
Firma kaj ĉiama
Staras Dia tron'.
Kaj neniam falos
Dia eklezi'—
Tion ja promesis
Kristo mem al ni.
Tial marŝu ĉiu,
Paca militist', k. t. p.

Ĉiu do aliĝu
Al felića hor'—
Nia kant' eksonu
En triumfa hor'.
Ĉie kaj ĉiame
Miljar' post miljar'
Pro laŭdad' al Kristo
Kantu la homar'.
Marŝu ĉiu paca, k. t. p.

Amen.

Antaŭ la Prediko la Pastro diras:

En la Nomo de l'Patro, kaj de l'Filo kaj de l'Spirito Sankta. **Amen.**

Oni sidiĝas.

Prediko, de Pastro Paul F. Hoffman, Parohestro: Christ Church Elizabeth, N. J.

Post la Prediko oni stariĝas. La Pastro diras:

Kaj nun al Dio tutpotenca, Patro, Filo, kaj Spirito Sankta, estu honoro, kaj laŭdo, kaj gloro, nun kaj en miljaroj de miljaroj. **Amen.**

Monkolekto

Memoru vi la vortojn de l'Sinjoro Jesuo, ke li diris, Doni estas pli feliĉege ol ricevi.

Prezentante la oferon la Pastro diras:

Al vi apartenas, Sinjoro, la grandeco, kaj la potenco, kaj la gloro, kaj la venko, kaj la majesto; ĉar ĉio ĉiela kaj tera estas la via; via estas la reĝeco, Sinjoro, kaj vi Superulo super ĉiuj regantoj.

Preĝu ni

Pastro: Ĉiopova kaj ĉiamviva Dio, Reganto de ĉio kaj ĉiela kaj tera; Aŭdu kompateme la petegojn de popolo via, kaj donacu al ni vian pacon dum ĉiuj tagoj de nia vivo. Per Sinjoro nia Jesuo Kristo. **Amen.**

Beno

Pastro: La Paco Dia, kiu superas ĉian komprenon, restigu korojn viajn kaj mensojn en la kono kaj amo de Dio, kaj de Filo lia Jesuo Kristo Sinjoro nia: Kaj la Beno de Dio Ĉiopotenca, Patro, Filo, kaj Spirito Sankta, estu inter vi, kaj restu kun vi eterne. **Amen.**

Restu Kun Mi

Restu kun mi: forestas jam la sun';
Kreskas mallumo; vesperiĝas nun;
Kiam amikojn plu ne havos mi,
Forta Helpanto, tiam restu Vi.

Homa vivtag' al fin' rapidas for;
Ĝojoj forpasas, ĉesas monda glor';
Ŝanĝojn sennombrajn ĉie vidas mi;
Ho; Senŝanĝulo, restu ĉiam Vi.

Ne kun teruroj, Reĝo de reĝar',
Sed malsevera, ema je bonfar',
Kun simpatio por mizera kri';
Tiel, ho Di', mi preĝas, restu Vi.

Restu kun mi dum ĉiu vivmoment';
Sen Via helpo cedus mi al tent'.
Kiu subtenus min se mankus Vi?
Tage kaj nokte restu do kun mi.

Ne timas iun mi, kun Via ben';
Ĉion renkontas brave sen ĉagren';
Super la tombo, ja triumfas mi;
Morto venkiĝas se nur restas Vi.

Ce la vivfino, kiel gvida stel',
Tra la mallum', direktu al ĉiel';
Ombroj forkuras antaŭ la radi';
Dum viv', dum mort', ho Dio, restu Vi.

Amen.